
# Aŭstraliaj  Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



**PLENUMITA 30/06/2022 Kvincentokdeknaŭ eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;


**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**
Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/ https://thesaker.is/

***Uzindaj ligoj*** *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro* *Freelang Vortaro* *lingvohelpilo* *PMEGramatiko* *esperanta retradio* *Plena Analiza Gramatiko*

*Pasintaj AE eldonoj* *Esperanta himno* *duolingo entute* *openclipart.*

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 713,100 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas 299,000 lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas 167,000 lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas 148,000 lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas 99,100 lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )

## Surhavu vizaĝmaskon.

*Roger Springer*



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**
**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.** Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Vi respondas pri via sano, do portu maskojn.

Eĉ la fuŝa studo de la angla plifaciligas la estontan studon de Esperanto en ne latin-alfabetaj landoj. *Roger S.*

Ĉu kapitulaco ne povas savi viajn vivojn, familiojn, domojn, urbojn, dignojn ktp *Roger Springer*



# la esperanta retradio



**Donas Bonan Cirkaŭ-5 Minutan Aŭskultadon kaj Legadon Ĉiun Tagon.**

KOMUNA 'LINGVO' PLIFORTIGAS LA AMON
27A JUNIO 2022



# La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo kunvenas je 10.30 atm ĝis 12ptm la unuan kaj trian sabatojn de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.
Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Whitewater, Suda Stejno.
La 2a de Julio estos la unua sabato. Venu !

## "Aŭstraliaj Esperantistoj" renkontiĝis en Germanio




Je la 4a de Julio, mi renkontis Peter Weide dum la 99a Germana Esperanto-Kongreso en Oldenburg/Nordgermanio. Peter regule kontribuas al Aŭstraliaj Esperantistoj de multaj jaroj. Tamen li ne estis in Aŭstralio dum jardekoj.

Ankaŭ mi ne plu estis en Aŭstralio post Marto 2020. Tial estis bona surprizo ke ni amikoj de la Esperanto-movado en Aŭstralio hazarde renkontiĝis. *Rainer Kurz*

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*



**EKSTRAĴOJ POR LECIONOJ DE "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard). Numero 19 de "Por Progresantoj".**

**GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:**

1). Donu ekzemplon de propozicio en kiu ĉiuj frazpartoj estas akompanataj de Suborda frazo.
2). Kial estas malĝusta diri "Juĝi lin kulpa estas malĝuste" anstataŭ "malĝusta"?
3). Al kioj ŝanĝi la frazon "La floroj por mia fratino en la ĝardeno" tiel ke klaras ĉu mia fratino estas aŭ ne estas en mia ĝardeno.
4). Kiuj du frazpartoj povas esti "en la ĝardeno" en la frazo "La infanoj en la ĝardeno ludas"?
5). Kial "Petro" ne estas akuzativa en "Li nomiĝas Petro"?

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. nunmero 589.

*Marcel Leereveld.*

## Demando

Kara Roger,

vi demandas, "Ĉu kapitulaco ne povas savi viajn vivojn, familiojn, domojn, urbojn, dignojn?"
Eble kapitulaco povos savi kelkajn domojn.

Pri ĉiuj aliaj aferoj mi tre dubas. Se Ukrainujo kapitulacos, kio estos la antaŭvidebla evoluo? Putin jam dum la sekureckonferenco en Munkeno 2017 kaj kelkfoje poste klare deklaris, ke lia celo estas restarigo de la rusia imperio. Se li sukcesos, la subigitaj popoloj devas kalkuli pri eĉ pli malbonaj vivkondiĉoj, politikaj kaj sociaj, ol tiuj, kiuj regas en Rusujo. Antaŭvidebla estas kruda kaj subprema ekspluatado de la venkitaj ŝtatoj.



Ĉu estas tio, kion vi volas rekomendi al la ukrainanoj kaj aliaj najbaroj de Rusujo?
Ĉu tion vi nomos paca solvo? Amike, *Peter Weide*

Respondo estas sube kaj estas JES

---



Kara Peter kaj aliaj amikoj (se mi ankoraŭ havas amikojn)

Dum miaj 91 jaroj sur tiu ĉi planedo, mi neniam havis korpan batalon. Do mia nazo estas rekta, miaj dentoj estas miaj (ne falsaj), mia cerbo funkcias sufiĉe bone, ktp, ktp.

Mi ne batalis ĉar mi kredas ke kiam oni ne povas solvi problemon inteligente, ŝanĝi la celon al kiu estas la plej bona batalanto kaj ne la plej inteligenta, estus stulta

Kaj nur stultulo batalas se li scias ke li ne povas venki. *Roger Springer* (timemulo sed sana)

Oni devas rigardi la eblajn estontecojn kaj elekti kion oni preferos.

Milito neniam helpas la ordinarajn homojn

---

Elkorajn dankojn kara Jenny pro via afabla dankesprimo pro la 100-jara karikaturo el *Punch,* koncerne la situacion en Ukrainujo/Rusujo. AE586



Konfesindas, ke estas nia kara Indrani Beharry-Lall kiu unue sendis ĝin al mi, kaj kiel vi Jenny, mi opiniis ĝin tro bona por ne plusendi al AE.

Bondeziregojn al vi kaj Alan *Vera Payne*

---

## SOLVOJ DE LA KVIZETOJ: *(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*



1). La kato, kiu apartenas al mia najbaro, mordis, kio signifas mortigis, la raton, kies korpo kuŝas tie, hodiaŭ matene, kiam mi sidis apude.
2). Ĉar la Predikativo ne povas esti Adverbo.
3). La floroj por mia fratino kiuj floroj troviĝas en mia ĝardeno,
kaj La floroj por mia fratino kiu fratino troviĝas en mia ĝardeno.
4). Suplemento kaj Adjekto.
5). Ĉar post "nomiĝas" Petro estas Predikativo. *Marcel Leereveld.*

---



Kara Roger! Jen io, se tio plaĉas al vi, por via bonega magazino "Aŭstraliaj Esperantistoj"!

Mi, en ĝi provas priskribi la sekvojn de la kruela leĝo, kiun la registaro ŝategas, ke patrinoj rajtas mortigi siajn ankoraŭ ne naskitajn infanojn! Restu feliĉa kaj bonhumora, de via amiko, *Bob Felby* Vidu paĝa 4

Antaŭ kelkaj jaroj, ne gravas kiom da jaroj, sed por diri la veron, ne temas pri multege da jaroj, sed, kompreneble, pli da jaroj.

Du homoj, unu virino kaj unu viro geedziĝis. Mi ne bone memoras multon, sed mi memoras, ke iom poste, plej verŝajne unu jaron poste, la virino naskis etan, belegan bebon. Tiu bebo estis knabo. Li estis knabo, eĉ knabeto, sed tamen li estis ne nur bela, sed eĉ belega. Ambaŭ gepatroj tuj amegis lin, estas treege malfacilege por mi diri, kiu el la gepatroj amis lin pleje, ĉu la patro aŭ ĉu la patrino.

La patrino restis en la malsanulejo, mi kredas, du semajnojn. Ŝi ne rajtis iri hejmen ĉar la knabeto ne estis tute sana, oni do deziris ke li restu tie iom pli longe, por ke la gekuracistoj povu kontroli kiel li fartas.

Tio necesigis ke la patro devis treege longan tempon ĉiun vesperon, post kiam li finis sian laboron en la laborejo, lavi sin kaj iri viziti kaj sian fileton kaj sian edzinon en la malsanulejo. Kaj tion li faris kun ĝojo, eĉ ĝojego!

Li kaj lia edzino antaŭĝojis baldaŭ iri hejmen kun la novnaskito, ili eĉ donis al li nomon, ili nomis lin Samuelo! Belega nomo por novnaskito, ĉu ne?

La trian vesperon, kiam la patro vizitis la bebon kaj sian edzinon en la malsanulejo, la flegistinoj haltigis lin ĉe la enirejo kaj admonis lin ke lia filo forlasis sian korpon dum la nokto pro iu nekonata malsano.

La edzo iris vidi sian edzinon. Ŝi kuŝis plorante en la lito. Tio silentigis la edzon, kaj estis al li preskaŭ tute ne eble paroli.

Pasis la tempo. La sekvan jaron la edzino refoje gravediĝis. Refoje kaj la edzino kaj la edzo treege ĝojege feliĉiĝis. Sed iuj el la gekuracistoj ektimis, ke la nova knabeto ne estas tute sana, kaj ke multe pli bone estas, ke ili mortigos lin antaŭ ol lia feliĉa patrino naskos lin! Ekzakte je la sama dato, kiam estis naskita Samuelo, naskiĝis alia fileto, sed mortinta, laŭ la deziroj de la gekuracistoj.

Tiu ĉi nova bebo tute ne nova, ĉar li estis precize la sama Samuelo, kiu naskiĝis unu jaron antaŭe. Nun denove estis mortinta, mortigita de la gekuracistoj, kiuj ja nur deziris helpi kaj la bebon kaj la gepatrojn. La leĝo kelkfoje estas bona kaj necesa, sed, kiel ni ĉiuj vidas, ofte ĝi estas kiom eble plejege kruela. Kio nun okazos al la gepatroj? Estas skribite en iu libro, kiun gekuracistoj verŝajne neniam havas tempon por legi, ke neniu el ni rajtas mortigi.

La problemo en la tuta mondo estas ja, ke tiuj, kiuj konsideras sin mem sufiĉe kleraj por inventi novajn leĝojn, jam tro ofte pruvis sin nekompetentaj inventi novajn, nek malnovajn leĝojn. La devo de tiuj, kiuj konsideras sin mem multe pli kleraj ol ni, ni, tiuj kiuj faras la pezajn laborojn kaj imposte pagas la erarojn de tiuj, kiuj konsideras sin mem pli valoraj oj tiuj, kiuj laboras, eĉ laboregas.

Tiu eta, bela kaj ridetema nova civitano tera, estis ja mortigita de tiuj, kiuj neniam laboras, sed nur ĝenas la impostopagantojn per stultaj leĝoj, kiuj tute ne taŭgas. Tiu eta knabeto ja tutan jaron antaŭĝojis baldaŭ revidi siajn gepatrojn, kiuj decidis, ke tiu nova knabeto tute ne estas nova knabeto. Li sendube estas la sama knabeto kiujn ili ricevis precize unu jaron antaŭe. *Bob Felby*

**3zzz**"La elsendo de la 27a de junio 2022 invitas pripensi pri la situacio de infanoj , kiuj neniam konis pacon en Gazao kaj pri la konsekvencoj por ĉiu civitano de la traktado de rifuĝintoj.Ĝi enhavas ankaŭ kortuŝan anekdoton "